

oktobro 1968

61-a jaro

n-ro 755 (10)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler

V-4252/61 (1968)

"Eldoni unu folion de kiu
ajn dokumento en kvar
lingvoj kostas al ni \$ 87;
unu hindo povas vivteni sin
per tiu sumo dum tuta jaro.
En 1967 ni eldonis
16 000 tiajn foliojn."

— Malcolm Adiseshiah,
Vic-Direktoro de Unesko

LA
KOSTO
DE
PLURLINGVISMO



Vi trovos

sur la sekvantaj paĝoj raportojn el Eŭropo, Kanado, Afriko kaj Soveta Unio. Tuj donante sekvon al la decidoj faritaj en Madrid, ni prezentas en la ĉefartikolo la maturiĝantajn planojn pri Semajno de Internacia Amikeco. Tre konkretan realigon de Internacia Amikeco praktikas la iniciatintoj kaj apogantoj de la agado medicina priskribita sur p. 142-4.

Duloke (p. 140 kaj 147) ni dediĉas spacon al sovetaĵoj eldonataj lastatempaj – ne pro iaj apartaj meritoj de tiuj, sed pro tio, ke la sinteno de potenca ŝtato al la lingva problemoj kaj la Internacia Lingvo estas ĉiam atentinda, eĉ kiam ĝi ne estas akceptebla. Malpli atentinda, sed plene akceptebla, estis la sinteno al Esperanto de alia ŝtato, iom malpli granda: la Libera Teritorio de la Insulo de la Rozoj. La kurioza historio troviĝas sur p. 138-140...

La kovrilo

Serĉante laboron, nutraĵon kaj – eble – teron por kulturi, tiu ĉi virino ĵus piediris kun sia familio 164 kilometrojn.

Ankoraŭ premata de la suferiga vojaĝo ĵus finita, ŝi tute ne kapablas paroli aŭ rideti.

Al ŝi kiel oni povus komprenigi, ke por ĉiu paĝo de ĉiu dokumento eldonata en granda internacia organizaĵo kiel Unesko, en kvar oficialaj lingvoj, necesas elspezi pli da mono, ol enspezas la plimulto da hindoj en unu tuta jaro? (La meza jara enspezo en Hindujo estas nuntempe \$ 84).

Kiel komprenigi la naciajn rivalecojn, kiuj insistas pri tiu plurlingva sistemo kaj forrifuzas neŭtralan lingvon? Kiel komprenigi... ja, kiel mem kompreni?

Enhavo

- 137 Semajno de Internacia Amikeco (Carlén)
- 138 La nekredebla Insulo de la Rozoj (raporto)
- 140 Soveta vidpunkto pri lingva egaleco
- 141 Parodokso en natursciencoj
- 142 Okulistoj al Orienta Afriko (Agado E3)
- 144 Elsinoro en nova vesto (raporto)
- 145 Informoj de CED
- 146 Recenzoj
- 148 Aĉablaj leteroj – nelegeblaj! (Schmid)
Leteroj de legantoj (legeblaj)
- 150 Pri unu funto kaj duono (uzo de 'da')
- 151 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 152 54-a Universala Kongreso, Helsinko, Finnlando, 1969
- 153 Perlabori monon... (Woessink)
- 154 Esperanto en radio
- 155 Oficiala informilo n-ro 416
- 156 Anoncetoj

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Redaktoro: D-ro V. Sadler.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 18,75 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 25,— gld.). Unuopa ekzemplero: 1,— gld.

Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-6.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano por diskonigo de la agado de UEA: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo. **Generala sekretario** kaj estrarano pri informado kaj kongresoj: S-ro G. Becker, D-6653 Bleskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

Estrarano pri turismo: S-ro M. Jaumotte, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

Estrarano pri lernejoj: S-ro J. Toczyski, skr. p. 57, Gdańsk 1, Polujo.

Estrarano pri financoj: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Amikeco trans limoj



Erik Carlén

Jam de la komenco Esperanto krom la celo doni al la mondo internacian lingvon ankaŭ havas bazan ideon, kiun oni ofte nomis "la interna ideo". Kelkfoje ĝi ĉe iuj aperis troigita, sekteca, kaj tiam ĝi nepre estis malutila al la afero mem. Sed en sana kaj nesekteca formo tiu ideo estas nature ligita al la nocio de tut-homara lingvo, jes eĉ necesa por la venko de la Internacia Lingvo.

Zamenhof esprimis la ideon jene: "Frateco kaj justeco inter la popoloj". Profesoro Lappenna diris (festparolado 1956), ke la bazaj ideoj de la Internacia Lingvo estas: "unue egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, do, neta kaj senkompromisa kontraŭrasismo, due tuthoma solidareco kaj respekto de la homaj rajtoj, formulitaj nun tute klare en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, trie libereco..."

Semajno de Internacia Amikeco volas esprimi tiun ĉi "internan ideon" per aliaj vortoj: Amikeco trans limoj — limoj naciaj, rasaj, lingvaj, kulturaj, politikaj kaj religiaj. Sed ni ne nur bele vortumas la ideon, ni ankaŭ volas konkretigi ĝin per agoj ĉe esperantistoj kaj ĉe aliaj.

La Semajno ankaŭ celas krei fortan, belan tradicion inter la esperantistoj kaj samtempe fari Esperanton konata al vasta publiko en tute nova maniero, kiun oni antaŭe ne uzis en la priesperanta informado.

Unuafoje en februaro de 1969

La Semajno okazos la unuan fojon en februaro 1969, 16-an — 22-an.

Por plenumi la laborplanon de la Semajno oni devas havi: a) Internacian Komitaton; b) Landajn Komitatojn (unu en ĉiu lando); c) Lokajn Komitatojn. Ni havas Internacian Komitaton, kaj en almenaŭ unu lando ni jam havas Landan Komitaton. La Esperantaj grupoj estas petataj elekti lokajn komitatojn.

Ĉiu Landa Komitato sufiĉe frue antaŭ la Semajno informu la gazetaron, la radion kaj la televidon en sia lando, ke la Esperantomovado okazigos Semajnon de Internacia Amikeco, pri ĝia celo kaj la aranĝoj. Kompreneble oni akcentu al la gazetaro, ke la Semajno ne nur estas por esperantistoj, sed por ĉiuj homoj. Oni povas mencii la streĉitecon en la mondo kaj ke tial ni des pli bezonas personan amikecon trans la limoj, ke tio kontribuas al la konservado de la paco. Oni povas doni kelkajn sloganojn de la Semajno, ekz. "Kulturu amikecon per afableco" aŭ "Amikeco faras la vivon pli riĉa".

Oni presigos specialajn salutkartojn okaze de la Semajno. Ili povas surhavi kelkajn simplajn frazojn en tri, kvar lingvoj. Kompreneble Esperanto devas esti inter ili. Kelkaj tiaj kartoj estos eldonitaj kaj tutcerte aĉeteblaj

ĉe UEA kaj ĉe la landaj Esperantaj eldonejoj. Iom post iom oni vendu ilin per librovendejoj. Ĉar ili estos plurlingvaj, ili estos uzeblaj ankaŭ de neesperantistoj. Mi proponas la nomon "amikokartoj".

La Landaj Komitatoj presigu afiŝetojn kun ekz. la sekvanta teksto:

Semajno de Internacia Amikeco. Memoru viajn amikojn en ...ujo kaj eksterlande, sendu al ili dum la Semajno saluton (uzu amikokarton), donacon, ekz. libron, skatolon de ĉokolado aŭ florojn.

Afableco naskas amikecon. Amikeco faras la vivon pli riĉa, tial kulturu ĝin. Jen vi havas okazon.

La Loka Komitato aperigu tiajn afiŝetojn en butikoj (ekz. flor-, libro- kaj ĉokoladvendejoj). La butikistoj volonte aperigos ĝin kaj ev. eĉ pagos sumeton por ĝi. La afiŝetoj kompreneble estos en nacia lingvo sed havu du frazojn en Esperanto: 1) "Semajno de Internacia Amikeco" (sub la nacia nomo de la Semajno) kaj 2) "Amikeco trans limoj", frazo, kiu estas en la emblemo de la Semajno.

En multaj urboj, kie oni havas ĝemelan alilandan urbon, oni povus fari publikan feston, invitante la urbestron fari paroladon k.s.

Mi proponas, ke ĉiu Esperanta klubo aŭ societo havu festan kunvenon la sabaton, antaŭ ol komenciĝos la Semajno. Jen parto de la proponita tradicio de la esperantistoj. En tiu kunveno oni komune skribu "amikokartojn" al eksterlandaj esperantistoj. Cetere ĉiu esperantisto devus uzi la "amikokartojn" dum la Semajno, sendante salutojn ne nur al esperantistoj sed ankaŭ al neesperantistaj amikoj.

La emblemo

Ĝi estas la "varmarko" de la Semajno kaj propraĵo de UEA. Ĝi ĉiam devas esti uzata ekzakte en la fiksita formo (logotipo). Ŝanĝetojn oni ne rajtas fari, kaj oni ne rajtas ĝin misuzi, t.e. por aliaj celoj.

La Internacia Komitato nun ege bezonas helpantojn ĉie en la mondo. Ĉiu landa asocio estas petata elekti Landan Komitaton kaj informi nin pri ĝia adreso. Ni konscias, ke nur parteto de la programo povos esti plenumita la unuajn jarojn. Sed ni estas konvinkitaj, ke Semajno de Internacia Amikeco estos afero ĉiame kreskanta, ke post 5 - 10 jaroj la tuta mondo festos ĝin. Tio signifos, ke ĉiu homo scios aŭ scietos, kio estas Esperanto, ke ĝi estas internacia lingvo kun la ideo de amikeco.


Por la Internacia Komitato:

Erik Carlén,

S-690 60 Hällabrottet, Svedujo



LA NEKREDEBLA



Cu la situo de la "Libera Teritorio" provokis la intervenon de la italaj aŭtoritatoj? Konstruita tuj ekster la teritoriaj akvoj apud la konata banejo Rimini, ĝi troviĝas en 20-kilometra distanco de la plej grava milit-aviadejo de Italujo, Miramare.

La historio de la unua "suverena ŝtato", kiu adoptis Esperanton kiel sian oficialan lingvon, estas historio dramoplena, miksaĵo el absurdo kaj eltrovemo, sukcesoj kaj ĉagrenoj. Por la ekstera mondo ĝi estas amuza anekdoto, – por la italaj aŭtoritatoj ĝi estis minaco al la ŝtata sekureco, – por la konstruintoj ĝi estis kolosa perdo financa, – por niaj legantoj, espereble, leginda rakonto...



En junio 1968 fondiĝis nova sendependa ŝtato. Ĝi tuj adoptis Esperanton kiel sian oficialan lingvon kaj decidis peti aliĝon al Unuiĝintaj Nacioj. Vi ne sciis? Ne mirinde: la "ŝtato" havas areon de nur 400 kvadrataj metroj!

Naskita el inĝeniera cerbo en 1964

La "Insulo de la Rozoj" naskiĝis el la maro iam en 1964 — ne per vulkana erupcio, nek sur konko, kiel Venuso, sed per homa konstru-lerteco kaj kapitalo. Fondis ĝin inĝeniero Giorgio Rosa el Bologna. Inĝeniero Rosa (el kies nomo, ŝajne, devenas la titolo de la insulo) jam antaŭ jardeko distris sin per la revo konstrui artefaritan insulon ĉe la itala marbordo. Kiucele? Nescieble. Al cerbo de inĝeniero certe sufiĉas la problemo en si mem, senkonsidere, ĉu ĝia solvo iel utilos.

Studoj komencitaj en 1958 montris, ke la revo ne estas tiel utopia, kiel eble mem supozis ĝia konceptinto. Proksime de la konata banloko Rimini ĉe la Adria Maro li trovis punkton, kie la marfundo 12 kilometrojn for de la bordo kuŝas nur ĉ. 14 metrojn sub la surfaco. Projekti ian plataĵon sur ŝtalaj kolonoj ne estis tro malfacile...

Je prudenta distanco de Italujo

Sed kial ĝuste 12 kilometrojn for de la marbordo? Evidente, ne ĉiu inĝeniero venas al la ideo konstrui insulon. Tio per si mem sufiĉas por krei jurajn problemojn, ĉar, kion la instancoj ne renkontis en sia antaŭa sperto, tion ili ne volonte stampas per sia aprobo. Situigi la konstruaĵon ekster la 12-kilometra limo de la teritoriaj akvoj — pli precize, je la punkto 44° 10' 48" N, 12° 36' 00" Or. — povas ŝajni, do, simpla decido de prudenta homo, kiu ne faras al si obstaklojn, se ne necesas.

Grandega kosto

La taksita kosto de la entrepreno estis kompreneble grandega. Sed Rosa, jam tute kaptita de sia ideo, sukcesis konvinki grupon da amikoj, ke la "insulo" povus fariĝi turisma allogaĵo kaj, sekve, eĉ profitiga. Fine, ses italaj industriistoj-financistoj konsentis kune disponigi la necesan kapitalon.

La unua provo ne daŭris longe: nek rilate

La "poŝtmarkoj" eldonitaj de la Insulo de la Rozoj jam havas valoron de po 1000 liroj por kolektantoj. Jen bloko de dek markoj je valoro de po "30 mills".

INSULO DE LA ROZOJ

la konstruadon, nek rilate la malkonstruon. En la nokto de la 12-a ĝis la 13-a de februaro 1965 la vintraj ondoj jam ĵetis sian indignon kontraŭ la homa impertinento, kaj la taglumo trovis nur ruinojn.

Kapo sur multaj koloj

La sperto estis instruata. La dua provo estis jam pli ambicia: novaj kolonoj el ŝtalo, pli larĝaj, ol la antaŭaj, ekstaris firme sur la marfundo, plenaj de cemento. Kiel kapo sur tiuj multaj koloj ekestis larĝa plataĵo kun solidaj ĉambroj kaj ĉirkaŭa koridoro. La Insulo de la Rozoj jam proksimiĝis al sia definitiva formo. La plano realigata antaŭvidis trinkejon, restoracion, poŝtoŝtationojn, bankon, vendejojn, kiu estus ĉiuj rekte alireblaj el la ĉirkaŭa promenejo. Tute supre, sur la "tegmento", estus teraso.

Nur la 22-an de junio ĉi-jara diskoniĝis, ke temas pri io pli, ol nura konstruaĵo. La posedantoj deklaris ĝin sendependa ŝtato! Unue la

reagoj estis mokaj: kiel povus sin vivteni sendepende tia artefaritaĵo? Absurde! Inĝeniero Rosa trankvile atentigis, ke ne mankas fiŝoj, kaj ke li sukcesis ĉerpi sensalan akvon el profundeco de 270 metroj.

Oficiala lingvo sur "poŝtmarkoj"

La planoj iris rapide antaŭen. Super la nova ŝtato ekflirtis ĝia nacia flago: orangkolora, kun tri ruĝaj rozoj kaj tri verdaj steloj sur fono blanka. Valuto estis elektita (nomita "Mills", moneroj estis fabrikotaj. Poŝtmarkoj, iom amatore presitaj, tuj aperis, kvankam la poŝtoŝtationoj ankoraŭ ne funkciis. Ili estis, tamen, la unua pruvo, ke la ŝtato elektis kiel sian oficialan lingvon — la Internacian.


"Invadita" de Italujo

Ne la elekto de neŭtrala lingvo signis la mortokondamnon de la juna ŝtato — nek la klaĉoj, ke iaj nedireblaj eksterleĝaj punktoj



*Inĝ. Giorgio Rosa,
kreinto de la
Insulo de la Rozoj*

Soleca insulanino elrigardas el sia regno, la "Libera Teritorio de la Insulo de la Rozoj". La "insulon" okupis armitaj fortoj de la itala polico kaj aliaj instancoj. La loĝantaro ne rezistis, sed la ĵura batalo daŭras.



Insulo de la rozoj


(daŭrigo)

konsistigis la veran motivon de ĝia ekster-teritoria situo. Sed kiam oni anoncis la intencon nomi ambasadoron en Bonn, la italaj aŭtoritatoj ekrigardis la aferon serioza kaj decidis interveni. Ĉu rajte, ĉu kontraŭe al internacia juro — pri tio oni ankoraŭ debatas. Sed restas la fakto, ke jam la 26-an de junio okupis la insulon "pro motivoj de sekureco" reprezentantoj de la italaj polico kaj ministerio de financoj kun armitaj gardistoj.

Minaco de eksplodigo

Protestoj kaj juraj plendoj restis senefikaj. Same la minaco de inĝeniero Rosa, ke li eksplodigos la tuton, se necese. Antaŭvideble, la financintoj daŭrigos sian juran batalon por forigo de okupantaj armitaj fortoj. Kaj, same antaŭvideble, la batalo estos longa...

Solece leviĝas el la maro la elpensajo de inĝ. Rosa. Videblaj estas la konstruataj butikoj kaj la ankoraŭ ne pretigita tegmenta teraso.



SOVETA VIDPUNKTO PRI LINGVA EGALECO en internaciaj rilatoj

Akcepti unu nacian lingvon kiel tutmondan — egale, ĉu la rusan, francan, anglan aŭ alian — kontraŭas la principojn de marksismo kaj ne povas solvi la lingvan problemon. Tiun ĉi senkompromisan vidpunkton diskonigis lastatempe oficialaj sovetaĵ eldonaĵoj. Ĝi renversas la stalin-epokan vidpunkton, ke la estonteco apartenas al la rusa lingvo, kaj samtempe refutas la lastatempajn asertojn, ke intensiva lernado de la angla lingvo en Soveta Unio signifas akcepton de tiu lingvo kiel monda.

La voĉo de Lenin

La ideo de lingva egaleco ne estas nova en Soveta Unio. En "Kritikaj notoj pri la nacia demando" Lenin mem skribis: "Ne estas marksisito, eĉ ne estas demokrato tiu, kiu ne rekonas kaj ne defendas la egalrajtecon de la nacioj kaj lingvoj..." Tamen antaŭ 20 jaroj oni skribadis pri monda rolo por la rusa lingvo. En "Literaturnaja Gazeta" (dec. 1948), la ĵurnalisto D. Zaslavski skribis: "La rusa lingvo fariĝis mondlingvo...", kaj aliloke: "...ni vidas la rusan aperi kiel la mondlingvo de l'socialismo". La organo de la Akademio de Sciencoj de Soveta Unio publikigis en 1950, ke la rusa lingvo "ne estas nur la lingvo de Soveta Unio, sed ankaŭ la Internacia Lingvo en la popolaj demokratioj".

Hodiaŭ tiu sama Akademio de Sciencoj eldonis verkon de Ermar Svadost (recenzo aperas sur p. 147, kiu neas la eblecon, ke iu ajn nacia lingvo povus fariĝi monda. La informagazeto Novaĵoj de Moskvo, eldonata en pluraj naciaj lingvoj, raportis detale pri la libro de Svadost en sia n-ro 25 ĉi-jara.

Kontraŭ privilegioj

Laŭ la raporto, la ideo, ke nacia lingvo povus fariĝi universala, "refutas la certigo, ke ĉiuj vivantaj lingvoj estas egalaj. En siaj verkoj Lenin diris plurfoje, ke marksistoj absolute kontraŭas la donadon de kiuj ajn privilegioj al kiu ajn nacio aŭ lingvo. Marksistoj ne povas apogi la ideon, doti per internaciaj privilegioj

En periodo, kiam la lingvaj rivalecoj en internaciaj rilatoj — precipe en la interŝtataj organizaĵoj kiel Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko — fariĝas ĉiam pli streĉaj, la vortoj de Lenin estas denove citataj por defendi la principon de lingva egaleco kaj kontraŭbatali la ideon, ke iuj lingvoj kvazaŭ rajte okupas pozicion aparte privilegian.

unu lingvon, kiun parolas unu aŭ kelkaj nacioj."

Danĝero de politika malekvilibro

"Universaligo de nacia lingvo kaŭzus politikan malekvilibron, kaj ĝi estas nure pragmatisma rimedo, kiu ne povas solvi la problemon de komuna lingvo..."

Inter alie, Svadost ankaŭ kondamnas la ideon (de Stalin), ke ĉiuj lingvoj povus iam kunfandiĝi, kiel "senbaza kaj nescienca".

Kvankam la soveta vidpunkto esprimita ĉi-jare ne proponas solvon de la problemo por la baldaŭa estonteco, la deklaro pri lingva egaleco estas en ĉiu okazo bonvena.



PARADOKSO EN NATURSCIENCOJ

Ĉu la lingva problemo jam solviĝas en la kampo de la natursciencoj? Ĉu la grandaj sumoj investitaj por intensa tradukado kaj aŭtomatigita inform-serĉado jam ebligas al la sciencisto sekvi la tutmondan evoluon de la koncerna scienco? Aŭ ĉu scipovo de nur unu lingvo — la angla, germana, rusa aŭ alia — povas sufiĉi? Foje aŭdiĝas jesaj opinioj.

Tute alian respondon prezentas kanada sciencisto, J. J. Levine, en la revuo "Total Translation" (1967, n-ro 1, p. 2). Kun siaj kolegoj-sciencistoj li entreprenis difinitan esplorprojekton en la kampo de molekula biologio. Komence ili konsultis la konatan resum-revuon "Chemical Abstracts" kaj trovis ĉirkaŭ 40 artikolojn, kiujn necesus legi por tiu projekto. Ili do bezonis anglalingvajn tekstojn de ĉiuj 40 artikoloj.

Unu tuta jaro perdita

Tiel rakontas Levine: "El tiuj artikoloj, 22 jam estis anglalingvaj, 9 estis ruslingvaj, 3 germanaj kaj po 2 francaj, italaj kaj polaj.

Sed la 9 ruslingvaj estis aparte gravaj por ni, ĉar ili priskribis metodojn de kemia sintezo pli bonajn, ol kiu ajn tiutempe uzata. Ni aĉetis anglajn tradukojn de la artikoloj sed ne sukcesis refari la rusajn eksperimentojn laŭ la priskriboj tie donitaj. Necesis do detale kontroli ĉiujn fontojn cititajn de la rusoj. Tio aldonis al nia laboro pliajn 20 artikolojn en ses aliaj lingvoj. Sume, ni povus ŝpari tutan jaron da esplorkomunado, minimume, se ni nur disponus anticipe pri kompletaj tradukoj de fremdlingvaj artikoloj."

Ĉu escepta kazo?

Levine prezentas nur sian personan sperton. Tamen frapa estas lia fina frazo: "Mi ne dubas, ke ĉiu sciencisto spertis similajn malfacilaĵojn en la lasta tempo."

Prezentigas la bela paradokso, ke la lingva problemo kostas al la sciencistoj tiom da tempo, ke neniam ili disponas tempon por dediĉi al ĝia solvo.



Bivakejo de la veturanta okulkliniko ĉe la masajoj en Kenjo (Dlalunga, distrikto Narok).

Ne estas sufiĉe konate, ke en la Orient-Afrikan landoj (Kenjo, Tanzanio kaj Ugando) po unu el sesdek loĝantoj estas blinda, plej ofte pro katarakto aŭ troĥomo. Nur en kelkaj grandaj urboj praktikas okulisto, sed aliloke — en la malproksimaj arbaregaj regionoj, kie, longdistance unu de alia, laboras manpleno da kuracistoj — okazas preskaŭ nenio. Problemo estas, ke tiuj kuracistoj okulkurace estas nesufiĉe instruitaj kaj spertaj. Antaŭ nelonge por la Orient-Afrika Servo de Flugantaj Kuracistoj (SFK) anoncis sin juna nederlanda okulisto, Dick H. Galema. En aŭgusto li forveturis al Nairobi, la ĉefurbo de Kenjo kaj la sidejo de SFK.

Operacii per la lernolibro

SFK fondis en 1960 d-ro Michael Wood, kun la celo mense kaj praktike helpi tiujn kuracistojn, kiuj devas solece labori malproksime de kuracaj centroj. Ofte ili batalas kontraŭ ĉiaj problemoj, ĉar ili ne estas specialistoj. Kompreneble ili funde preparis sin por sia tasko en tropikaj landoj kaj tute ne timas fari malgrandan operacion, se necese kun instrulibro en la mano! Sed ĉiam restas problemoj, kiujn ili prefere priparolas kun fakkuracisto. Ĉar la distancoj estas grandaj, ĝenerale ne estas eble transportigi pacienton al unu el la foraj malsanulejoj, kie ĉeestas teamo de specialistoj.


Flugantaj kuracistoj

Antaŭ kelkaj jaroj oni starigis sistemon de radiokomunikado inter la malproksime laborantaj kuracistoj kaj la malsanulejoj, tiel ke reciproka tra-etera konsultado fariĝis ebla. La diversaj specialistoj ankaŭ regule radioprelegis pri gravaj medicinaj temoj kaj problemoj por siaj disaj kolegoj. Poste la radioservo pligrandigis al flugservo. Apud 76 pli aŭ malpli grandaj malsanulejoj, en kiuj plejofte laboras nur po unu kuracisto, oni per la helpo de la loĝan-

Okulistoj al Orienta Afriko

Helppagado de IKUE gajnas novajn fortojn

Organizi per la rimedo de Esperanto internacian helpon por afrikanoj suferantaj pro nenecesa blindeco: — tio estis la kuraĝa projekto lanĉita antaŭ du jaroj de la prezidanto de IKUE, s-ro J. A. Tuinder. La 1-a Komuna Kongreso de IKUE kaj KELI, okazinta en Limburg, Germanujo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto, akceptis (inter aliaj proponoj pri ekumena agado) la kampanjon AGADO E₃ kiel estonte komunan programon de IKUE kaj KELI.



Tiu ĉi paro — la 33-jara okulisto D. H. Galema el Amsterdam kaj lia edzino s-ino M. W. Galema-Wartena — plifortigos la kuracistan teamon en Orienta Afriko.

taro konstruis terenon, kie aviadilo povas surteriĝi kaj leviĝi. Tiel estiĝis SFK, kiu ebligas rapidan transporton de kuraciloj kaj vakcinaĵoj ĉiuloken kaj operacian aŭ konsilan helpon de vojaĝantaj specialistoj. En tiu kadro laboras sesdek nederlandaj kuracistoj, al kiuj aliĝas Dick Galema kun sia edzino, asistonta lin en lia praktiko.

SFK estas financata de privataj monkontribuoj el Usono kaj el pluraj eŭropaj landoj. Kelkfoje ankaŭ registaro subvencias. Rilate al la nederlandaj kuracistoj, aktivantaj en Orienta Afriko, la situacio ne estas favora; kelkaj devos

reiri, ĉar la financaj fontoj tute sekigis. La forveturon de ges-roj Galema al Nairobi ebligis la Institucio Prof. D-ro H. J. M. Weve. Temas pri la institucio, al kiu la tutmonda esperantistaro donacos "sian" klinikon "D-ro L. L. Zamenhof", surradan okulkuracejon. Por tiu celo estas kolektitaj jam 16.000.— ned. gld. (necesas 25.000.—)! AGADO E₃ nomiĝas la helpkampanjo, t.e. ESPERANTISTOJ ESPERIGAS ESPERANTOJN. Ĝin inspiris la idealo kaj praktiko de d-ro L. L. Zamenhof mem. AGADO E₃ estas la respondo de la Esperanto-movado al la nenecesa blindeco en Afrikaj evolulandoj!

Medicina laborlingvo?

La Internacia Lingvo jam ludis kaj ludas gravan rolon en tiu ĉi urĝa agado. Ĝi estas la rimedo, per kiu la organizantoj povis mobilizi la kunlaboron en multaj diversaj landoj. Ne nur la efika monkoklektado, sed ankaŭ informado al la vasta publiko jam rezultis el la kampanjo AGADO E₃. Multaj kunlaborantoj reverkis la ricevitajn informojn kaj aperigis ilin nacilingve en sia landa gazetaro. Nederlanda televid-elsendo baldaŭ atentigos pri la iniciato.

Novajn kontribuojn por la Klinikon D-ro L. L. Zamenhof oni povas ĝiri al n-ro 1020100 de s-ro J. A. Tuinder, Van Hulststraat 1, Ter Apel, Nederlando. Eble jam post kelkaj monatoj la bezonata sumo estos atingita!

Kiu laboros en kliniko Zamenhof?

Ĉu io restas tiam farebla ankoraŭ? Multo! Dudek-kvin mil guldenoj pagos la klinikon, sed restas solvota la homa faktoro. Kiu laboros en la Klinikon Zamenhof? Kiu okulisto dediĉos kelkajn jarojn el sia vivo al kuraca migrado tra iu regiono de Afriko? La iniciatintoj esperas, ke, kiel la mono, tiel ankaŭ la homoj estos troveblaj per Esperanto. Ili alvokis, ke sin anoncu okulisto, flegistino kaj eventuale alia helpanto, prefere el diversaj landoj, kiuj havas esperon, ke la propra registaro aŭ iu privata fonduso estos preta pagi ilian vojaĝon kaj restadon en Afriko.

Grupeto internacilingva serĉata

La ideo, ke la kunlaborantoj estu el diversaj landoj, pensigas pri plia rolo de la Internacia

D-ro Burkitt montras al flegisto la teknikon de traĥom-operacio. Ofte devas labori en Afriko personoj nesufiĉe kvalifikitaj, "kun lernolibro en la mano".



Okulistoj al Orienta Afriko

Lingvo en la historio de tiu kuraĝa entrepreno. Estas facile imagi diversnecian grupeton, kiu uzus inter si la Internacian Lingvon — kaj kio pli konvenus al kliniko je la nomo de Zamenhof? Kiu scias, kiaj praktikaj aplikoj de Esperanto povus kreski el tia nukleo?

Revo efektivebla

Tro longe la publiko en diversaj landoj ligis al Esperanto ideojn pri 'kabineta revado' aŭ opiniis ĝin utiligebla nur en la iama estonteco. Kia pli trafa respondo al tiaj miskonceptoj, ol medicina helpo al evolulandoj, financita pere de Esperanto kaj uzanta kiel laborlingvon la Internacian! Jen 'revo' tre baldaŭ efektivebla.

Blinda knabo lernis ludi bekfluton. Miloĝ da afrikanoj suferas pro blindeco, kiun povus forigi relative simpla operacio. La agado lanĉita de IKUE celas doni al ili novan esperon.



EL SINORO EN NOVA VESTO

Internaciaj FERIAJ Kursoj, 21-28 julio 1968

La Internacia Altlernejo en Elsinoro en kelkaj rilatoj ne estas komparebla kun la sama loko antaŭ ekz. dek jaroj. Novkonstruitaj domoj donas al la hodiaŭa studanto tie plenan komforton en atmosfero vere ĉarma. En aliaj rilatoj ĝi konservas sian malnovan stilon. La belega parko kun sia por promenadoj alloga lageto restas, kaj la Esperanto-kurso ĉiusomera jam de jardekoj havas sian aktivecon tie.

S-ro Friis, la konstanta gvidanto de tiu Esperanto-kurso, konas la arton havigi al la aranĝo diversajn, sed ĉiam nur altnivelajn kursgvidantojn. Tial estas eble por komencanto sen ia ajn antaŭa lingvoscio pri Esperanto, same kiel por jam sufiĉe sperta esperantisto, ion ĉerpi dum la ĉiutage trihoraj kursoj. Fakte sufiĉe streĉa libertempo. Distron ni trovis en la posttagmezaj ekskursoj kaj vesperaj pli aŭ malpli seriozaj aranĝoj. Kaj ni, kiuj nenion volis perdi de la semajno, povis ĉe glaso da fame bona dana biero pasigi la lastajn vesperajn horojn kaj eĉ uzi parton de la nokto por agrabla komuna kunestado.

Gulli Svensson (Svedujo)

La Internacia Altlernejo en Helsingør: aspekto malantaŭa, somere 1968.



INFORMOJ DE

CED

**CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO
PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO**

**77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081.**



1968

**Jaro de
Homaj Rajtoj**

UEA en Seminario de UN pri Homaj Rajtoj

De la 18-a de junio ĝis la 1-a de julio 1968 okazis en Londono Seminario pri la Homaj Rajtoj, tute speciale pri la Rajto de Kunveno kaj Rajto de Asociiĝo. La Seminario estis organizita de la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj en kunlaboro kun la Brita Registaro. Estis reprezentitaj 23 ŝtatoj el Eŭropo, Azio, Afriko kaj Ameriko. Krome, ĉeestis observantoj de trideko da neregistaraj organizaĵoj, inter kiuj Universala Esperanto-Asocio, reprezentita de ĝia prezidanto prof. d-ro Ivo Lapenna.

Malhelpoj al Esperanto-organizaĵoj

Dum du semajnoj oni aŭskultis raportojn pri la rajto organiziĝi sur nacia kaj internacia niveloj por politikaj, religiaj kaj kulturaj celoj, kiel ankaŭ por ekonomiaj kaj sociaj taskoj. Post la raportoj kutime sekvis diskuto, pri kelkaj punktoj eĉ tre vigla. Dum la reprezentantoj de la ŝtatoj ofte malkonsentis pri esencaj eroj, la observantoj de neregistaraj organizaĵoj havis sufiĉe unuecajn starpunktojn pri ĉiuj diskutitaj demandoj. La reprezentanto de UEA aparte atentigis pri la fakto, ke en pluraj landoj ne povas funkcii Esperanto-organizaĵoj, kio kontraŭas ne nur la principojn de la Universala Deklaracio, sed ankaŭ la preskribojn de la konstitucioj en la koncernaj landoj. Krome, li emfazis, ke la rajto organiziĝi internacie renkontas gravajn obstaklojn pro devizaj limigoj, kiuj fakte malebligas la realigon de la rajto aparteni al internaciaj organizaĵoj.

Simpatio por starpunkto de UEA

Ekster la oficialaj kunsidoj, la observanto de UEA havis la okazon priparoli kun multaj kolegoj — ŝtataj reprezentantoj kaj observantoj de aliaj organizaĵoj — la lingvan aspekton de la rajto organiziĝi internacie, kaj la lingvan diskriminacion. Montriĝis en tiuj interparoloj, ke la granda plimulto da reprezentantoj kaj observantoj kun simpatio rilatas al la starpunkto de UEA.

Profesoro Lapenna raportis pli detale pri la rezultoj de la Seminario al la jurista kunveno en Madrid.

CED/7 en la hebrea

Jus aperis en Tel Aviv la unua hebrelingva eldono de la grava dokumento CED/7, "Bazaj faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)". La dokumenton tradukis en la hebrea s-ro Aŝer Ron, surbaze de plene ĝisdatigita teksto de la dua Esperanta eldono. Eldonis ĝin Esperanto-Ligo en Israelo, en preso ofseta kaj je vendoprezio de £ 1,— israela.

Dek tri eldonoj en ok lingvoj

Tiu ĉi grava eldonaĵo sendube helpas plue fortikigi la jam vigle disvolvigantan movadon en Israelo. CED forte rekomendas ankaŭ al aliaj landaj asocioj konsideri nacilingvan eldonon aŭ reeldonon de la dokumento CED/7, kiu montriĝis dum plurjara uzado en diversaj landoj tre efike kaj vaste uzebla informilo. Ĝis nun la dokumento CED/7 aperis (dum nuraj 4 jaroj) po dufoje en Esperanto, la angla (krome represita en Usono) kaj la hispana, kaj po unufoje en la franca, hebrea, pola, japana kaj nederlanda (ĉi-lasta krome ankaŭ en brajla eldono).

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
S-ro Geoffrey Sutton, Britujo	0-	8-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	12-	0-	0
S-ro F. Parker, Britujo	2-	0-	0
Gesinjoroj Laurie, Britujo	4-	0-	0
S-ino R. Seddon, Britujo	2-	0-	0
Gesinjoroj Holmes, Britujo	3-	0-	0
S-ro E. Burg, Nederlando	0-	5-	9
S-ro J. Derks, Monako	0-	11-	7
S-ro J. P. Jensen, Danlando	1-	3-	3
S-ro W. H. King, Novzelando	0-	11-	7
S-ino Agda Olsson, Svedujo	80-	15-	1
S-ro K. McLennan, Britujo	1-	7-	2
S-ro E. Burg, Nederlando	0-	5-	9
S-ro O. C. Lang, Danlando	0-	11-	7
S-ro E. F. Dean, Britujo	20-	0-	0
S-ro J. P. Jensen, Danlando	1-	3-	3
S-ro E. Burg, Nederlando	0-	5-	9
S-ro J. Giessner, Germanujo	0-	14-	0
S-ro V. H. Rasmussen, Danlando	0-	11-	3
S-ro W. L. Simpkins, Usono	10-	0-	0
S-ro E. Burg, Nederlando	0-	5-	9
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	0-	13-	7
S-ro E. Burg, Nederlando	0-	5-	9
F-ino E. M. Maasbommel, Nederlando	1-	3-	1
La stato je la 30-a de junio 1968	144-	2-	2

Al ĉiuj donacintoj CED esprimas tutkoran dankon. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

**FARIĜU ABONANTO DE LA
DOKUMENTOJ DE CED EN LA
INTERNACIA LINGVO: 5,50
GULDENOJ JARE (22 STELOJ)**

Varia albumo el Bulgarujo

Recenzas Wouter Pilger (Amsterdam):

Ciun someron (kaj aliaj kantoj). El la bulgara tr. Asen Grigorov. Sofia: Balkanton / Esperanto-turismo, 1968. Disko duflanka, monofona. 26 cm. 33 r/m. (BTH 721).

Balkanton riĉigas nian esperanto-diskotekon per bone preparita varia disko, okaze de pluraj ĉi-jaraj Esperanto-kunvenoj en Bulgarujo. Tekniko: senriproĉa. Voĉoj kaj akompano (A-flanko): bone profesiaj. Arangoj: plaĉaj, adekvataj. Prononco: bulgareca sed ĝenerale bona, krom en la unua numero, "Ciun Someron", tre ĉarme kantita, kun 1920-eca akompano, de Mimi Nikolova, kiu estas bedaŭrinde ne ĉiam komprenebla sen (ne-aldonita) teksto. Sekvas du pri-maristaj kantoj, trafikaj por tiu, kiu ŝatas tiun ĝenron. Kaj laŭdo pri Montaro Ropotamo, virkvarteta kun ina solo.

La B-flankon plenigas kvar german(ec)aj "turistaj" kantoj, entuziasme kantitaj koruse, kun akordiona akompano, fare de 18 instruistinoj. La tekstoj estas troveblaj en kolekto "Kun Kanto tra la Mondo", ĵus aperinta en Sofio.

Bona ebleco por interŝanĝi diskojn inter orienta kaj okcidenta Eŭropo! Tiel ambaŭflanke la disko-eldonejoj plientuziasmiĝos...

Mendu ĉe UEA: prezo ankoraŭ ne konata.



LA UNUA VORTARO ESPERANTO-ARABA

Recenzas Italo Chiussi (Frankfurt/Main):

Esperanto-araba poŝvortaro, de Nassif Isaac. Kairo: la aŭtoro, 1968. 285 p. Frontispico. 18 cm. Bd. 6000 vortoj.

Inteligente adaptante la bazan strukturon de "Plena Vortaro de Esperanto" al la (por okcidentanoj) nekutima pejzaĝo de la araba lingvo, d-ro Nassif Isaac sukcesis kompili la unuan Esperanto-araban vortaron (same rekomendindan por araboj kaj por lernantoj de la araba lingvo) kaj tiel krei gravan ponton por la arabaj landoj. Oni prave povus rigardi tiun unuan ponton historia okazaĵo kaj ĝiajn relative etajn mankojn (precipe presajn) tute kompreneblaj kaj facile forigeblaj okaze de sekvantaj eldonoj.

La fakto, sagace substrekitita de d-ro Isaac jam en la antaŭparolo, de la evidenta parenceco inter multaj Esperantaj kaj arabaj radikoj, ne estas hazarda fenomeno. La fama lingvisto Sheikh Muhammad Ahmad Mazhar, advokato en Lyallpur, poste eĉ pli detale pritraktis la saman tezon en la interesa, ĵus aperinta urdulingva artikolo "Esperanto-zbân" (la lingvo Esperanto) en la ĵurnalo "Al Fazl" (Rabwah, Pakistano, n-ro 167, p. 3), kiu tute pravigas la rimarkojn de d-ro Isaac.

Mendu ĉe UEA: 4,50 gld. / 18 st., afranko 10%.

KANTOMODOJ DE TRE DIVERSAJ LANDOJ

TEJO-sekcio eldonaktivas

Recenzas Wouter Pilger (Amsterdam):

Meksikio kantas, kantoj de M. M. Ponce k.a. Meksiko: Esperanta Meksika Junularo, 1967. Disko duflanka, monofona. 18 cm. 33 r/m. (JN-ESP-1).

Antaŭnelonge fondita, la meksika TEJO-sekcio jam eldonis diskon! Kvar meksikaj kantoj: "La Hirundoj" kaj "Steletoj" — iom tristaj. "Miksteka Kanzono" el sudorienta Meksiko same, kvankam melodio kaj arango estas sendube pli leĝeraj. "Serenado" havas kontraŭdiran (al la titolo) tekston: "ellitiĝu vi, ĉar l'aŭroro ekbrilas nun". Tekstoj aldonitaj. En la tradukoj ĝenas unu-du lingvaj kaj akcentaj eraroj. Prononco klara kaj bona. La kovrilo avertas: "neniu el la kunlaborantoj estas profesulo", sed en kantado (du viroj, unu ino) kaj akompano (piano, gitaro), tiuj "artamatoroj" plaĉe impresas. Kontraste, la teknika kvalito estas unuvorte malbona, koncerne registrigon (mikrofona regado ktp) kaj disko-preson (perturbo!) — la lasta espereble ne en ĉiuj ekzempleroj same ĝena. Cifoj aĉetantoj kun malpli altkvalita gramofono havos avantaĝon.

Mendu ĉe UEA: prezo ankoraŭ ne konata.

Certe la plej neordinara disko ĉi-jara en Esperanto estas tiu sub la titolo "Antaŭen!", recenzita ĉi-apude. Ĝi kombinas dors-al-dorse la torditajn tonojn de M. A. Numminen kun lia adapto de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Konvene



neordinara estas ankaŭ la aspekto de verkisto-kantisto Numminen, kies finlingvaj registraĵoj furoras en lia lando. Numminen havas talenton por eltrovo de neortodoksaj kanto-tekstoj: li jam antaŭe uzis ekstraktojn el sociologiaj lernolibroj kaj parton de la armeaj reguloj pri ĉeval-prizorgo.

La homaj rajtoj - kantataj

Recenzas Asen Grigorov (Bulgarujo):

Antaŭen! Kantoj de M. A. Numminen. Disko-grafa Societo de Finnlando, 1968. Disko duflanka, monofona. 18 cm. 45 r/m. (GN-6). Kun teksto.

En la jaro dediĉita al popularigo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, finnoj havis la bonan ideon elekti ĝiajn plej gravajn tekstojn, provizi ilin per melodio kaj tion ĉi eldoni en la formo de sondisko. Rezultis agrabla muzikaĵo. La seriozan klasikan melodion, kiu plene respondas al la teksto, agrable modernigas estrada akompano. La kanton interpretas per sia plaĉa emocianta aldo kantistino Päivi Paunu. La bela melodio estas facile lernebla kaj plenumbla pro sia simpleco, pro la neampleksa tonaro; ĝi estas tuj alirebla ankaŭ por aŭskultantaro kun meznivela muzika kulturo.

Alia kanto apartenanta al la sama disko estas la humorista "Mi kun mia virino en la parko de nia Parlamento". Ĝia melodio ĝuste redonas la sencon de la teksto. La vira voĉo (de Numminen mem) en apartaj momentoj ŝanĝas sian tembron per falsetaj ekkrioj, konformaj



Päivi Paunu, konata finnlanda popolkantistino, registris grandan sukceson en Finnlando per sia kantado de ekstraktoj el la Universala Deklaracio. Nun ŝia voĉo sonis ankaŭ Esperante.

al la teksto. Facila estrada kanto kun vigla, gaja tangoritmo.

Mendu ĉe UEA: 6 gld. / 24 steloj, afranko 10%.

MISPREZENTOJ EN SOVETA VERKO

Recenzas W. A. Verloren van Themaat (Amsterdam):

Kak vzniknet vseobščij jazyk? (Kiel estiĝos tutmonda lingvo), de E. Svadost. Moskva: Nauka, 1968. 285 p. 23 cm.

Kiel komunisto la aŭtoro opinias, ke sub la tutmonda socialismo kaj komunismo la homaro havos unue lingvon universale konatan, kaj fine ununuran. Li pritraktas la demandon pri ĝia estiĝo. Malakceptinte kelkajn aliajn teoriojn, la tutmondiĝon de nacia lingvo (kiel "lingvan imperiismon") kaj la kunfandiĝon de ĉiuj lingvoj (ĉar tia kunfandiĝo neniam estis atestita), li konkludas, ke la mondlingvo estos planlingvo. Sed la ekzistantajn planlingvojn li malakceptas, pro motivoj ne tiom teknike-interlingvistikaj, kiom ideologiaj, sociologiaj kaj kulturaj.

Esperanton li ligas al ideologio, laŭ kiu ĝi sole povus solvi ĉiujn internaciajn konfliktojn. La pli multaj esperantistoj kredas nur, ke Esperanto povas helpi plifaciligi la pacan kunvivadon kaj komunikadon de ĉiuj popoloj. Ke Esperanto estas uzata por malsamaj politikaj celoj, estas nur nature. La angla lingvo estas uzata eĉ por pamfletoj kontraŭ "angla-usona imperiismo".

La tempon por krei vivipovan planlingvon li juĝas nematura. La mondlingvon konstruos ia komunisma IALA, kiu komencos sian laboron post la tutmonda enkonduko de la socialismo.

Prave li akcentas, ke la mondlingvo ne povos esti "helpingvo" en la senco de difekta esprimilo. Pri la literaturaj ebloj de la konstruota mondlingvo li estas tre optimisma (p. 122). La Esperantan literaturon li prijuĝas nefavore, sed surbaze de ekzemploj tute nereprezentaj. Kiel majstroverkon de la Esperanta poezio li citas "La vojo" de Zamenhof. Esperanto bezonis tridek jarojn por literature maturiĝi. Kiu pretendas, ke en alia planlingvo estas ebla literaturo pli bona, povas doni nur unu pruvon: ĝin produkti.

Mendu ĉe UEA: prezo 1,42 rubloj (+ afranko 10%)

LERNILO KLARA SED ARKAIKA

Recenzas István Szerdahelyi (Budapest):

Wir lernen Esperanto sprechen, de Ludwig Schödl. Leipzig, Enzyklopädie, 1967. 184 p. 19 cm. (Sprachen für jedermann).

Por Esperanto estas ĉiam tre valore, se en iu serio de fremdlingvaj lernolibroj aperas ankaŭ lernilo de la Internacia Lingvo. En la serio "Sprachen für jedermann" la lernolibro de Esperanto aperas kiel la 12-a.

Ĝi estas verko tre preciza, klara kaj bone uzebla. La diserigo de la studmaterialo estas konsekvenca kaj proporcia. Riproĉebla estas nur ĝia konservativeco: kaj laŭ la metodo (sin-teza) kaj laŭ la temaro ĝi estus povinta aperi en la sama formo antaŭ 50 jaroj (nur la televido montras, ke ĝi aperis nun!). Kaj ĝia lingvistika koncepto (ekz. deklinacia paradigmo sur p. 31) kaj ĝia instrumentado estas vere arkaikaj.

Kelkajn dubindajn frazojn mi notis: La birdo flugas sur la kaĝo... (p. 44 — ĉu eblas flugi sur kaĝo?); Sed ne ek de longe (p. 46 — 'ek' estas superflua!); Kiom da kostas ĉi tiuj ŝtrum-petoj? (p. 53 — ĝuste: Kiom kostas...?); ktp.

En la libro tro abundas la gepatra-lingva teksto. Ĝuste tio estas ĝia plej grava manko: ĝi konservas dum la tuta kurso la interĝenadon de la du lingvoj.

Mendu ĉe UEA: 5,50 gld./22 st., afranko 10%.

Tradukinto pravis

Skribas F. A. Bouillot-Dephot (Parizo):

Kun granda surprizo mi legis en la recenzo pri "La spleno de Parizo", ke la frazo "Je l'aimerais, déesse et immortelle" povus kaj eĉ nepre devus signifi: "ĉar ĝi estas diino kaj senmorta", dum la sola ĝusta senco laŭ la franca estas tiu donita de la tradukinto...

Biblioteko de ISAE

Skribas s-ro C. Støp-Bowitz (Oslo):

En la juli-aŭgusta "Esperanto" aperis artikolo sub la titolo "Biblioteko de ISAE monde konsultebla". Tio povus komprenigi, ke ĝis nun tiu biblioteko ne estis monde konsultebla. La bibliotekisto, kiu siatempe prenis sur sin ĝian prizorgadon, — s-ro H. de Caspary — disponigis al ĝi parton de sia hejmo kaj multe klopodis por riĉigi ĝin. De tiu tempo la biblioteko estis "monde konsultebla". Alia afero estas, ke preskaŭ neniu konsultis ĝin...



Duono de
la homaro
ne uzas
la latinan
alfabeton

Japanoj, kiuj ne respondas...

Antaŭ pluraj semajnoj la korespond-servo de UEA petis min serĉi du seriozajn japanajn esperantistojn por korespondado kun du okcidentuloj. Sed samtempe mi legis la plendon, ke multaj japanoj jam post la unua leter-interŝanĝo ne plu daŭrigas, ne plu respondas. Tion mi tute ne povis kompreni, ĝis hodiaŭ venis mia lernanto kun poŝtkarto el... nu, la lando ne gravas.

La Esperanto-lernanto, pri kiu mi parolas, loĝas tre proksime de mi. Kiel simpla laboristo li ne vizitis universitaton, sed ordinaran lernejon. Iom post iom li lernis legi Esperantajn vortojn kaj eĉ frazojn. Sekvis serĉado de korespond-adreso en iu Esperanto-gazeto kaj la unua poŝtkarto. Kaj venis ankaŭ respondo, aerpoŝte! Bela multkolora bildkarto, grandformata — sed kun teksto nelegebla. Ĝi estis nelegebla por li, komencanto, kiu unuafoje vidis latinlitere manskribitan tekston el Eŭropo. Unu sama signo foje signifis "o", foje "a". Alia signo jen "c", jen "e" kaj aliloke "a". Inter "ri", "vi" kaj "n" kaj "u" li vidis nenian diferencon. La "p" kaj "f" intersimilis kun "j", kaj la forgesitaj strekoj de "t" aperigis aliajn vortojn kun "l". Pri "s", "z" kaj "r"-simileco, pri apudenmigrintaj supersignoj mi

CITAĴOJ

Esperanta turisto, n-ro 2/1967: "... estas petataj delogitoj kaj geesperantistoj el ĉiuj landoj, ke anonciĝu por kunlaboro..."

Unesco Features: "Singapuro ... estas lando kun plurlingvaj kaj plurkulturaj tradicioj, en

AFABLAJ LETEROJ - NELEGEBLAJ!

Wilhelm Schmid

La legantoj, kies leteroj aperas sur tiu ĉi paĝo, plejparte skribis kun modela klareco, aŭ sendis tajpitan tekston. Al ili ne estas direktita la ĉi-suba artikolo. Sed ĝian enhavon tamen povas tutkore subteni la Centra Oficejo de UEA, kie enigmaj manskribaĵoj foje vojaĝas de unu oficisto al alia, ĝis fine al iu venas luminiĝo. La artikolon, verkitan de Wilhelm Schmid, ni senskrupule represas el "La Praktiko".

povus daŭrigi, kaj restus malmultaj literoj senriproĉaj. Feliĉe tiu juna japano bezonas iri nur kelkajn paŝojn por trovi solvon de tiu "skribenigmo": mi povis legi la tekston tre facile kaj trovis la skribon eĉ beleta. Same juĝus ankaŭ multaj eŭropaj esperantistoj, ĉar la multjara uzado kaj legado de latinliteraj manskriboj ekzercis la okulojn ekkoni la plej malgrandajn diferencojn kaj kvazaŭ diveni la intencon de la skribinto. Tamen, kiam mi komparis la diversajn literojn kun la lerneje lernitaj "modeloj", mi plene komprenis, ke mia najbaro povis deĉifri eĉ ne unu vorton. Same mi ankaŭ komprenis, kial multaj japanaj komencantoj neniam respondis: ili povis legi nek la leteron, nek la adreson sen helpo de sper-tulo. Kaj se pro ĉiu nelegebla letero oni devas konsulti la kursgvidanton aŭ alian, ofte mal-proksiman, personon... nu, la interesiĝo rapide velkas.

Duono de la homaro

Proksimume duono de la homaro ne uzas la latinan alfabeton. Esperantistoj el tiu duono de la homaro povas ja bone legi presliterojn latinajn, sed havas grandan malfacilaĵon deĉifri nekларan manskribon. Skribu al ili ne "flue", nek "bele", nek "elegante"; skribu klare!

kiu la ĉefaj etnaj grupoj estas ĉinoj, malajoj kaj hindoj. ... De post 1960, lernejoj, kiuj instruas per la kvar oficialaj lingvoj (malaja, ĉina, tamila kaj angla), donas ses jarojn da senpaga elementa klerigo. ... Sed en tia nova, multelingva nacio, kie tre necesas kreskigi senton de nacia unueco, la bezono de komuna rimedo de komunikado estas ĉiam pli sentebla"

Protesto pri „Germanujo”

Skribas Detlev Blanke (Berlino):

Kun miro kaj surprizo mi legas en "Esperanto" n-ro 5/68 (sub mia recenzeto), ke mi loĝas en "Germanujo". Mi protestas kontraŭ tiu falsigo de la nomo de mia ŝtato. La klasifo de mia ŝtato, la Germana Demokratia Respubliko, sub la nocio 'Germanio' estas diskriminacio, subtenanta la arogon de la Germana Federacia Respubliko, reprezentanti ambaŭ germanajn ŝtatojn.

Respondas la redaktoro:

Estas miskompreno: ni ja ne indikis, ke "Germanujo" estas la nomo de ŝtato. Ni aldonis ĝin por indiki nur LOKON. La sufikso '-uj' signifas (PV p. 487) "Landon, loĝatan de la popolo montrita per la radiko". Nek 'lando' nek 'popolo' estas nepre politika koncepto. Oni komparu la uzon de 'Arabujo' (februaro, p. 27).

Pri Hector Hodler

Respondas H. W. Holmes (Londono):

Se oni verkas biografion, oni devas esplori ĉiujn eblajn fontojn por atingi la faktojn. Via korespondanto, kiu je p. 109 de "Esperanto" (juli-aŭgusto) volas korekti mian artikolon, ŝajne esploris nur unu.

Estas vere, ke Privat diras en sia "Historio de Esperanto", ke Hodler "finis la gimnazion". Tamen en la libro "Hector Hodler" (UEA, 1928) Ed. Stettler diras: "Tiu Geneva Kongreso fiksas la sorton de Hodler. Ne fininte la gimnazion li forlasis la benkojn de la lernejo por neniam revidi tian institucion, kaj eniris sanktan Esperantujon." Similajn asertojn oni trovas en la "Analiza historio" de Drezen kaj en Enciklopedio de Esperanto.

Mi opinias, ke mia komento "... estas dube, ĉu Hodler finis siajn gimnaziajn studojn..." ĝuste prezentas la dubon pri la fakto.

Vivu la redaktoro?

Skribas Otto Böhm (Germanujo):

Gratulon al la nova "Esperanto"-redaktoro pro la numero junio 1968. Ĝi finfine enhavas kelkajn paĝojn por vere legi, ne nur oficialaĵojn kaj administraĵojn pli malpli interesajn. Nun denove ĝi valoras la abonprezon. La legado dankinde bezonas nun pli ol dek minutojn.

Komentas la redaktoro:

Bone, sed ŝajne estiĝis ia miskompreno. Ne estas nova la redaktoro de "Esperanto" — male, li fariĝas nur ĉiam pli malnova, bedaŭrinde!



Carolina Minnaja

PRI UNU FUNTO KAJ DUONO



Skribas Carolina Minnaja (Romo):

Kun intereso mi legis la artikolojn de Henri Vatré pri la temo "Kiam uzi DA?". Tamen mi tute ne povas samopinii pri tio, kion li diras koncerne la frakciojn.

En la artikolo aperinta en la aprila numero li diras: "Post duono, triono, kvarono kaj aliaj

onoj oni neniam uzu DA, ĉar per si mem tiuj frakcioj difinas sian suplementon, la postan substantivon". Ne temas ĉi tie pri Esperanto, sed pri matematiko! Oni devas bone atenti, kiu estas la suplemento de tiuj frakcioj! Tute logika estas la frazo "duono DE paĝo", ĉar la paĝo estas io difinita; sed la frazon "duono DE pano" oni povus uzi nur, se al la vorto "pano" oni donus la signifon de "panbulo" (tamen tiu signifo troviĝas nek en la PV nek en iu ajn alia vortaro de mi konata); "pano" per si mem ne estas difinita, kaj frakcio de io nedifinita ne havas sencon (kion signifus ekz. "duono de akvo"?).

En la ekzemplo citita el la Malnova Testamento "dekono DA delikata faruno" sen iu ajn dubo temas pri elipsa formo anstataŭ "dekono DE efo DA delikata faruno" (fakte, tute ne havus sencon paroli pri "dekono DE faruno").

Koncerne lian konsilon "Ne diru 'funto kaj duono DA pano' aŭ 'horo kaj kvarono DA paŭzo', ĉar la suplementon de la frakcia substantivo devas enkonduki DE kaj ne DA", mi atentigas, ke en la diritaj frazoj la vortoj "pano" kaj "paŭzo" tute ne estas suplemento respektive de "duono" kaj de "kvarono", ĉar ĉi tiuj du frakcioj rilatas respektive al la vortoj (neesprimitaj) "funto" kaj "horo". Fakte, la kompletaj frazoj estus: "funto kaj duono DE funto DA pano" kaj "horo kaj kvarono DE horo DA paŭzo". Logike, la uzo de DA devas esti tute sendependa de la fakto, ke temas pri "unu aŭ pluraj funtoj DA pano" aŭ pri "duona funto (aŭ "duono DE funto") DA pano"; pri "unu aŭ pluraj horoj DA paŭzo" aŭ pri "duona horo (aŭ "duono DE horo") DA paŭzo".

NECESAS AKTIVIGA KONSILADO

Skribas Niilo Kavenius (Finnlando):

La revuo "Esperanto" nun estas el teknika vidpunkto tre kontentiga. Se paroli pri la enhavo: mi ofte pensis, ke nia ĉeforgano ne estas sufiĉe aktiviga, entuziasmiga, batalema!

Nova laborplano?

Tre bona ideo estis prezenti Unuan kaj poste Duan Bazan Laborplanon. Tio montris al landaj kaj lokaj asocioj vojon kaj labormetodojn. Tamen, jam longe pri ili oni ne parolas, kaj oni ne montris iun novan. Mankas aktiviga, instiga konsilado flanke de la Estraro kaj la asocia organo al la membraro. Oftaj artikoloj verkitaj de kelkaj aktivuloj jam sufiĉus memorigi al la membraro la plej gravajn taskojn.

Laŭ propra ĵurnalista sperto mi dezirus, ke la revuo malfermu tian korespondan fakon, kie kiu ajn membro povus demandi aŭ prezenti sian opinion — sen ke oni postulus "perfektan, seneraran Esperanton".

Donacoj por Kapitalo Hodler

En n-ro 752-3 oni skribas pri "Kapitalo Hodler 68". Bonega ideo. Sed ĉu oni ne akceptos pli malgrandajn monsumojn? Pro kio oni atendas, ke nur tiuj, kiuj havas multe da mono, donos ian sumon?

Respondas la redaktoro:

Ni faros nian eblon por aperigi artikolojn aktivigajn kaj samtempe allogajn en la estonteco. Kvankam "Esperanto" ne havas apartan rubrikon por la leteroj de legantoj, ĝi tamen aperigas tiajn leterojn (interalie ankaŭ tiun de s-ro Kavenius). La redaktoro tute ne postulas "perfektan, seneraran Esperanton", sed kompreneble rajtas kaj devas senerarigi la leterojn antaŭ la publikigo!

Kompreneble UEA volonte akceptas ankaŭ malgrandajn kontribuojn por la Kapitalo Hodler. Vidu pri tio la artikolon en la septembra "Esperanto", p. 134. Anticipan dankon!

LOKE - FAKE - PERSONE



Mag. Isaj Dratwer
(vidu: Persone)

LOKE

Albanujo

- Raporto en "El Popola Ĉinio" konfirmas, ke aperis libro en Esperanto en Albanujo — ŝajne la unua iam eldonita en tiu lando. Temas pri 48-paĝa broŝuro de Kristo Frasheri, kun la titolo "Gjergj Kastrioti-Skanderbeg, Nacia Heroo de Albanio (1405-1468)". Eldonis Naim Frasheri; disvendas N. Sh. Tregetimit Librit, Tirano je la prezo \$ 0,40.

Ameriko

- Fondiĝis en Venado Tuerto (Sta Fe, C.C. 165, Argentino) "Escuela Americana de Esperanto", kiu celas instrui Esperanton per korespondaj kursoj tra tuta Hispan-ameriko.

Finnlando

- Televido Helsinki raportis pri la Esperanto-kurso en la Somera Universitato de Turku, kie instruis Andrzej Pettyn, redaktoro de Pola Radio.

Hungarujo

- Ĵus aperis en po 14 300 ekzempleroj la 4-a eldono de la tre sukcesaj vortaroj hungara-Esperanta kaj Esperanta-hungara de Pechan. Ĝis nun la eldonkvanto atingis po 32 000.

Israelo

- Per helpo de la Kultura Departamento de Histadrut (Laboristaj Sindikatoj), la landa asocio ricevis novan belan ejon en Tel Aviv. Adreso: str. Rembrandt 18, teretaĝo.

Madagaskaro

- Ĉirkaŭ mil personoj vizitis ekspozicion de la madagaskara Esperanto-junularo, kiun inaŭguris du reprezentantoj de la Ministerio pri Kulturaj Aferoj, 1-6 aprilo 68.

Kvardek-persona rapida kurso de Esperanto en Rio Ceballos, Argentino, allogis atenton de enlandaj pedagogoj, kiuj venis studi la metodon. La kurson, entute 14-horan, gvidis prof. Enrique Kohei el Rosario.



Soveta Unio

- Nove fondita respublika Esperanto-komisiono en Kiev ekeldonis 1/4-jaran bultenon "Tra la Soveta Ukrainio", kiu antaŭe aperadis ukraine, ruse, angle kaj france. Unua numero 41-paĝa, multobligita. Adreso: Esperanto-Komisiono, Ukraina Societo de Amikeco, str. Kirova 5a, KIEV-21, Soveta Unio.
- Televido Rostov-Don elsendis 1/2-horan intervjuon kun UEA-delegito Viktor Gruŝko pri la valoro de Esperanto en la internacia korespondado.

FAKE

Juro

- Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, aliĝinta faka asocio de UEA, distribuis al ĉiuj delegitaroj ĉe la Konferenco de UN pri la Juro de Traktatoj (Vieno, marto-majo 1968) 32-paĝan Esperantan tradukon de "Projekto de artikoloj pri la juro de traktatoj".

Medicino

- En Ĉeĥoslovakujo (ĉe Josef Hradil, Český DUB 137/111, okres Liberec) ekaperis "Medicinstaj novaĵoj", multobligita sed valora bulteno, kiu amplekse resumas gravajn studojn el la nacilingva revuaro.

Sennaciismo

- Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kongresis la 41-an fojon ĉi-jare en Utrecht, Nederlando, de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto. El 382 aliĝintoj ĉeestis 347 el 19 landoj. La programo inkluzivis 4 prelegojn, diskutojn politikajn kaj ekskursojn.

Stratoj

- Ekzistas novaj Zamenhof-stratoj en San Pablo de Ordal (Hispanujo, 5 majo 68), Schoten (Belgujo, 1968), Nimes (Francujo, 5 majo 68), kaj Meerwijk (Nederlando, 15 aŭg. 68). Novajn Esperanto-stratojn havas Québec (Kanado, printempo 68) kaj Bingen-Büdesheim (Germanujo, 11 majo 68).

PERSONE

Dratwer

- Antaŭ ĝuste 50 jaroj eklernis Esperanton mag. Isaj Dratwer, antaŭnelonge komitatano de UEA kaj prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo, ĝenerala sekretario de la pola Landa Asocio en la periodo 1947-1958.

Harry

- S-ro Ralph L. Harry, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, fariĝis ambasadoro de Aŭstralio en Sajgono. De 1965 ĝis 1968 li estis ambasadoro en Bruselo.

Wüster

- La 3-an de oktobro festas sian 70-jariĝon la honora membro de UEA d-ro Eugen Wüster, internacie konata pro siaj pioniraj laboroj sur la kampo de terminologia normigo kaj sur tiu de la Esperanta vortaro. D-ro Wüster krome aliĝis al la Redakta Komitato de la nova revuo de CED "La Monda Lingvo-Problemo".



Nur unu el ĉ. 60 000 lagoj de Finnlando, la Kongreslando 1969. Vi ne kredas? Iru nombri mem!
(Foto: Suomen Matkailulitto)

En Finnlando vi trovos trankvilon

54a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki, 26 julio - 2 aŭgusto 1969

Alta Protektanto: D-ro Urho Kaleva Kekkonen,
Prezidanto de Finnlando.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Aliĝkotizoj

Ĝis la 31-a de decembro 1968 validas jenaj:

1. Kongresano ne membro individua
de UEA 70 gld.
2. Kongresano membro individua de
UEA kun Jarlibro (MJ) 60 gld.
3. Kongresano membro individua de
UEA kun Jarlibro kaj "Esperanto"
(MA) 50 gld.
4. Edz(in)o de Kongresano en kat. 1 30 gld.
5. Edz(in)o de Kongresano en kat.
2 aŭ 3 25 gld.
6. Junulo ĝis 20-jara 21 gld.
7. Universitata studento ĝis 30-j. 35 gld.
8. Blindulo 28 gld.

Unua Oficiala Bulteno kaj Aliĝilo

Kvarpaĝa, grandformata, ilustrita Bulteno estas senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, ĉe landaj asocioj kaj ĉefdelegitoj kaj ĉe la kongresaj perantoj. La aliĝilo, ricevebla ĉe la samaj adresoj, troviĝos krome en la novembra "Esperanto".

La Kongresurbo

Helsinki estas la ĉefurbo de Finnlando, urbo

de 530 000 loĝantoj, ĉe la suda marbordo de la lando. La temperaturo tagmeza en la komenco de aŭgusto estas kutime ĉ. 21° C.

Infankongreseto

Paralele kun la Kongreso okazos la 11-a Internacia Infankongreseto por infanoj aĝaj de 6 ĝis 13 jaroj, kiuj flue parolas la Internacian Lingvon.

Glumarko


La Kongreso eldonis belan, tri-koloran glumarkon en horizontala formato. Dekmarka folio kostas 0,50 gld. (2 st.)

KOREKTO

En la juli-aŭgusta "Esperanto" ni informis, ke la fondo de interlingvistika sekcio ĉe la Soveta Akademio de Sciencoj rezultis el prelego de d-ro István Szerdahelyi. D-ro Szerdahelyi atentigas, ke lia prelego okazis laŭ invito de la jam antaŭe fondita sekcio. Ni pardonpetas pro la misinformo.

LA JUNA VIVO

Sanĝoj en la redakcio de la rubriko "La Juna Vivo" necesigis prokraston de la raporto pri la Internacia Junulara Kongreso en Tarragona. La TEJO-rubriko reaperos, dupaĝa, en la novembra "Esperanto".



Perlabori monon...

Mia artikolo kun la supra titolo en la numero de junio 1968 ne restis seneŝa. Unu el la kunlaborantoj rajtigis min publikigi lian leteron pri la temo. Li skribis:

"Via alvoko estis tre necesa. Mi esperas, ke multaj klopodos plibonigi la financojn de UEA per varbado de anoncoj. Ne estas facile hodiaŭ varbi reklamojn, ĉar la propagando-kasoj de la urboj, entreprenoj kaj turistoficejoj estas tro ŝarĝitaj. Ne ĉiu letero, ne ĉiu vizito, ne ĉiu parolado estas sukcesriĉa.

Kvar el dek sukcesis

Ĉiukaze mi montris aŭ transdonis unu ekzempleron de la UEA-jarlibro kiel pruvon. El dek varb-provoj estis kvar sukcesriĉaj: (sekvas: turistoficejo, trafikunuiĝo, internacia entrepreno kaj komitato por aranĝo de grava inter-

nacia festo). Ankaŭ la varbado de novaj membroj por UEA estas tre necesa. Ĝis hodiaŭ mi varbis: du personojn kiel novajn membrojn J-MA kaj kvin personojn kiel dumvivajn membrojn DM: (sekvas la nomoj). Mi esperas, ke ankaŭ en tiu rilato multaj klopodos varbi."

Kiel vi vidas, kvankam li mem skribis, ke ne estas facila la varbado de anoncoj, tamen en kvar el la dek klopodoj li havis sukceson. Lia agado estu ekzemplo por aliaj. Ni kore dankas lin kaj ĉiujn aliajn pro la farita laboro. Ni aldonu, ke, krom vortoj de laŭdo, ili kompreneble ricevos 10 % de la pagitaj sumoj por la anoncoj. En la du estontaj monatoj ankoraŭ estas tempo por varbi anoncojn por la Jarlibro 1969.

E. J. Woessink,
Estrarano pri financoj

...eble por la Kongreso en Portland?

Panoramo de Portland, Usono, urbo elektita por la Universala Kongreso en 1972.



ESPERANTO EN RADIO



Ĉiujn informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris 16, Francujo. En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa Tempo oni aldonu unu horon. Aliajn horsistemojn vidu en la Jarlibro 1968, Unua Parto, p. 120. Mallongigoj: I = Informoj; P = Parolado; K = Kurso.

Ĉiutage

15.30-16.00 Warszawa, 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 31.45 m (9540 kcs), 31.35 m (9570 kcs), 31.01 m (9675 kcs), 25.39 m (11815 kcs), 25.09 m (11955 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.

19.30-19.45 Budapest, 240 m (1250 kcs), 75.09 m (3995 kcs), 42.25 m (7100 kcs), 41.55 m (7220 kcs), 25.19 m (11910 kcs), 19.79 m (15160 kcs), 16.77 m (17890 kcs), Radio Budapest, Esperanto-disendoj, Budapest VIII., Hungarujo.

Dimanĉo

11.00-11.30 Pekino, 47.69 m (6290 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.

11.30-12.00 Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.

12.30-13.00 Pekino, 25 m, 19 m. I.

20.00-20.20 Roma, 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs), 25.40 m (11810 kcs). P. Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.

20.05-20.30 Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.

21.30-21.45 Teresina, 210 m (1430 kcs), 88.63 m (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.

21.45-22.00 Manila, 25.17 m (11920 kcs). P. Far East Broadcasting Co., Box 2041, Manila, Filipinoj.

22.45-23.00 Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.

23.30-23.55 Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.

Lundo

00.00-01.00 Sorocaba, 278 m (1080 kcs), I.K. Rádio Clube de Sorocaba, rua São Bento 245, Sorocaba (São Paulo), Brazilo.

12.05-12.15 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 16.80 m (17855 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.

17.30-17.40 Bratislava, 428 m (701 kcs), 273 m (1097 kcs), 243 m (1232 kcs), 188 m (1594 kcs). K. Radar, Lenin-placo 13/a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.

18.00-18.15 Stoke-on-Trent, 94.9 Mcs (mod. frekv.). K.I. Radio Stoke, Cheapside, Hanley, Stoke-on-Trent (Staffs.), Britujo. (la kvaran lundon de la monato, de 18.00 ĝis 18.30; kelkaj programeroj en la angla).

Merkredo

6.45- 6.55 Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Pollando.

9.45- 9.55 Bratislava. Kiel lunde.

12.05-12.15 Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).

13.45-14.00 Wien, 203 m (1475 kcs), P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan merkredon).

14.00-14.15 Stoke-on-Trent, kiel lunde.

18.45-19.00 Resende, 196 m (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Braz.

23.05-23.30 Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Bilbao, Hispanujo.

Ĵaŭdo

10.00-10.15 Manila. Kiel dimanĉe.

21.50-22.00 Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 25.25 m (11890 kcs), 19.60 m (15305 kcs). P. (D-ro Baur).

23.05-23.20 Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.

23.05-23.20 Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).

Vendredo

13.15-13.30 Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fe), Argentino.

20.00-20.30 Pekino, 45.32 m (6620 kcs), 45.17 m (6640 kcs), 42.37 m (7080 kcs), 30.43 m (9860 kcs). I.

Sabato

11.00-11.30 Pekino, kiel dimanĉe.

12.30-13.00 Pekino, kiel dimanĉe.

20.00-20.30 Pekino. Kiel vendrede.

21.50-22.00 Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).

NOTO: La stacioj Bern, Budapest, Pekino, Roma, Warszawa regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

En la Esperanto-fako de Pola Radio. Baldaŭ plimultiĝos la personaro pro la plioftigo de la elsendoj el Varsovio.



Enciklopedio de Esperanto



Ulrich Lins ĉef-
redaktas la novan
Enciklopedion

Nova Fondaĵo de UEA

Nia Lingvo Internacia estas pli ol 80-jara. En 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de Esperanto, kaj, laŭ ĝia modesta aspekto, oni apenaŭ povus imagi, ke ĝiaj facile rompeblaj paĝoj enhavas tiel ŝtalan fortikon, tiel edetruieblan dinamikon. Sed ja tiu manlibro posedis la mikson de realismo kaj idealismo necesan por movi intereson kaj fervoron de homoj, kaj tial la lingvo firme enradikiĝis, komencis kreski kaj disbranĉiĝi kaj fortikiĝis laŭlonge de pli ol 80 jaroj.

La unua Enciklopedio

La arbo Esperanto fariĝis tiel branĉoriĉa kaj frondabunda, ĝia disvolviĝo tiel pleniĝis de interesaj detaloj, ke fariĝis nepre necesa tion registri, kiel eble plej fidinde kaj objekte. Tial jam antaŭ ĉirkaŭ 40 jaroj, meritplena eldonisto, nome Vilhelmo Bleier, lanĉis la unuan *Enciklopedio de Esperanto* en Budapeŝto, kiu en du ilustritaj volumoj traktis la fenomenon Esperanto en ĝiaj aspektoj lingva, socia, kultura, kaj kiel ĝi konsistigis gravan eron en la vivo de multaj homoj el ĉiuj mondpartoj. Unuvorte: temis pri la plej detala *historio* de la Movado ĝis tiam ekzistanta. Sed tiu *Enciklopedio* jam de jaroj estas tute elĉerpita, kaj la vivo de la Movado dum tiuj pasintaj 40 jaroj senhalte disvolviĝis.

Analizi, kribri, kompari, redakti

Nuntempe la Movado do tre forte bezonas unu tian konsultilon. Kompreneble, temas pri herakla laboro. Analizi, kribri, kompari, redakti en metodon tuton la informojn konatajn kaj aldone la nun esploratajn, tio postulas longan, pedantan, plurhoman laboron. Tamen tia ambicia entrepreno jam nun efektiviĝas. Grupo de esperantistoj, kies nomoj garantias seriozecon kaj altan profesion nivelon al iliaj kontribuadoj, preparas la gigantan laboron, kiu konsistigos la novan *Enciklopedio de Esperanto*. Tiu libro certe fariĝos mejloŝtona, ne nur de nia propra literaturo, sed ĉefe kiel dokumentilo de la Movado.

Plurvoluma entrepreno

Kiel dirite, la entrepreno estas herakla; sekve ĝi estas samtempe multekosta. La financaj rimedoj disponeblaj ne sufiĉas por kovri la kostojn de la redaktado kaj eldonado (temos pri pluraj volumoj). Sed ni ne dubas, ke ĉiu esperantisto, kiu scias taksi la epokfaran gravecon de la redaktata *Enciklopedio de Esperanto*, eldonota de STAFETO sub la aŭspicio de CED, ne hezitos kunhelpadi per sia mono. Tiucele, la Estraro de UEA, trastudinte

la koncernan laborplanon, decidis en sia printempa kunveno nunjara starigi Fondaĵon por helpi la aperon de la nova *Enciklopedio de Esperanto*.

Sub la ĉefredaktado de U. Lins, kiu asociis al sia laboro la esploranton R. Haupenthal, jam akceptis esti ĉefkunlaborantoj A. Albault, W. Auld, M. Gjivoje, K. Kalocsay, I. Lapenna, Miyamoto m., J. Régulo, V. Sadler, W. Solzbacher, H. R. Tonkin kaj G. Waringhien; multaj aliaj sin devontigis kunlabori pri konkretaj temoj aŭ fakoj. Tio montras al vi la neceson de la plenumata laboro.

Kunhelpu pluporti la torĉon!

INTERNACIAJ KONKURSOJ 1968

Stato je la 31-a de aŭgusto 1968

Konkurso I

Pozicio	lando	kvoto	poentoj	%
1 (1)	Jugoslavio	3792	4575	120,65
2 (2)	Italujo	3816	3780	99,06
3 (3)	Japanujo	3829	3645	95,19
4 (4)	Svedujo	6415	6008	93,66
5 (5)	Nederlando	5322	4875	91,60
6 (6)	Danlando	2764	2520	91,17
7 (7)	Britujo	6095	5266	86,40
8 (8)	Usono	4144	3555	85,79
9 (9)	Belgujo	1912	1630	85,25
10 (10)	Germanujo	6579	5465	83,07
11 (11)	Francujo	7234	5909	81,68
12 (12)	Finnlando	2608	2100	80,52
13 (14)	Svislando	1949	1525	78,25
14 (13)	Brazilo	3188	2338	73,34
15 (15)	Hispanujo	2919	1890	64,75

Konkurso II

1 (1)	Grekujo	250	397	158,80
2 (2)	Israelo	488	630	129,10
3 (3)	Aŭstrujo	1270	1200	94,49
4 (4)	Kanado	955	890	93,19
5 (5)	Sud-Afriko	250	225	90,—
6 (6)	Aŭstralio	1327	1174	88,47
7 (7)	Argentino	693	583	84,13
8 (11)	Norvegujo	1460	1125	77,05
9 (8)	Madagaskaro	250	187	74,80
10 (9)	Islando	250	165	66,—
11 (10)	Nov-Zelando	1265	785	62,06

La Internaciajn Konkursojn partoprenas tiuj landoj, el kiuj oni povas libere aliĝi al UEA. Poentoj estas aljuĝataj laŭ la nombro de membroj, jene: AM = 1; MJ kaj J-MJ = 5; MA, MA-K kaj J-MA = 10; MS = 15; Patrono kaj DM = 50. La kvoto estas la meza poentaro atingita en la lastaj 5 jaroj. Interkrampaj ciferoj indikas la pasintmonatajn poziciojn. Varbu membrojn!

Oficiala informilo

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de decembro neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida, kaj la adresoj aperos en la Jarlibro 1969.

Aŭstralio: Jim Dimo, Jennifer Clack. **Brazilo:** Benedicto Silva, Sebastião José Domingues. **Germanujo:** Rolf Roth, Alois Hans, Fritz Günther. **Hindujo:** S. C. Gupta. **Hispanujo:** Adonis Gonzalez Meana. **Italujo:** Gianfranco Landucci, Giovanni Barbieri, Leone Costantini. **Kostariko:** John E. Falk. **Soveta Unio:** Paul Tõnisson. **Svedujo:** Eduard Schuldenfrei. **Usono:** Elfrieda D. Walters, Thomas G. Ludwig.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1968)

Argentino: Buenos Aires (D), Moreno. **Aŭstralio:** Redcliffe. **Belgujo:** Antwerpen (JD). **Britujo:**

Leicester (VD). **Bulgarujo:** Loznica. **Danujo:** Aarhus (VD & FD UN-aferoj). **Francujo:** Be-ziers (FD Fervojo, Turismo). **Germanujo:** Hagen (D, FD filatelo), Höxter. **Japanujo:** Sapporo. **Jugoslavio:** Svetozarevo. **Kanado:** Regina. **Nederlando:** Diemen. **Usono:** Chicago (D, FD horloĝoj).

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Harada, s-ro Hideki, Okajama-si, Japanujo.
Harris, d-ro W. F., Lower Hutt, Nov-Zelando.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

277 Frithiofson, s-ro Tage; 278 Sedendahl, s-ro B., Svedujo. 279 Steinberg, s-ro S. V., Usono.

DONACOJ (Gld.)

Ĝenerala kaso: Aŭstrujo: Rentmeister, s-ro F. W., 2,80. Francujo: Thiollière, s-ro E., 7,33. Germanujo: Salzmann, s-ro Karl-Ernst, 17,—. Svedujo: Carlén, s-ro E., 200,—.

Universala Kongreso: Hispanujo: Ruiz, s-ro, 10,38.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

ANONCETOJ



Tarifo: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.

◀ **Korespondas per sonbendoj:** W. Meijns, Paul Krugerstraat 13, Wormerveer, Nederlando. Hobioj: arta muziko, turismo.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

La Poŝtmark-kolektado daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, ol tio, kion vi mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Zacho (por UEA), Amosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, 5594 Strib, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj handikapitojn de tuta mondo. U.I.E.A. estas kunlaboranta fakasocio kun UEA.

La Esperantista Kolektanto ... reaperas, petu specimenon kaj sendu tekston por senpaga anonco al s-ro R. Melo, 15 rue de la Richelardièr, 42 St. Etienne, Francujo.

Tutmonda asocio, kuraĝiganta la kredulojn preĝi por la mortintoj, ĉefe la plej forgesataj. Michel Pierru, 29 rue Baillon, 62-Calais, Fran-

cujo, plezure informas vin.

Amico del Mondo (Amiko de la Mondo) — organizaĵo por la disvastigo de Esperanto — senpage vin kontaktigos kun propraj gelnantoj kaj eksaj gelnantoj. Skribu, precizigante la temojn, pri kiuj vi interesiĝas, al: "Amico del Mondo, Via Podgora 13, I-20122 Milano, Italujo."

S-ro Mehmet Telyakar, 29-jara, deziras edziĝi kun riĉa fraŭlino el la libera mondo. Adreso: Aydinlik Sokak 23, Ortaköy-Istanbul, Turkujo.

Foiro de Barcelona sendos du afiŝojn 1969 en Esperanto al ĉiu persono, kies nomo aperas en la Kongreslibro de la 53-a UK, Madrid. Ceteraj personoj, kiuj deziras ricevi ilin, bonvolu doni sian adreson al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona.

Mi havas grandan intereson por malnovaj numeroj de ĉiuj Esperanto-gazetoj. S-ro R. Molera, Sta. Joaquina, 13, Moyá (Barc.), Hispanujo.

Brazilanoj deziras interŝanĝi poŝtkartojn kun la tuta mondo. Fotoj estus bonvenaj! Bv skribi al: 1. Jeovah Pinto Maia, 17j. fraŭlo, Rua Padre Anchieta no. 1131, Fortaleza, Ceará; 2. Marcelo Engrácia, 15j. knabo, Rua Dr. Camilo Matos no. 1587, Ribeirão Preto, Est. São Paulo.

Salutu 34-an Nov-Zelandan Kongreson, 2-6an januaro 1969. Adreso: F. E. Wood, 24 Stewart Road, Mt. Albert, Auckland 3.

KORESPONDEMULOJ !

Se vi publikigos korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiunmonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

**"YES, ESPERANTO IS THE ANSWER
TO THE WORLD LANGUAGE PROBLEM"**

de Ivo Lapenna

kaj

**"REMARKS
ON THE ESPERANTO SYMPOSIUM"**

de Mario Pei

Tiuj ĉi gravaj studoj pri la lingva problemoj kaj ĝia solvo aperis presite en la angla lingvo kiel 16-paĝa CED-dokumento Doc. A/IV/4-6. Kune ili formis konvinkan informilon bone uzeblan ekz. inter studentoj k.s. medioj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: 1,— gld.



Unesteno

Universala Esperanta Stenografio

Neprafo por ĉiu

Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich

BELARTO

estas la titolo de du grandformataj kajeroj redaktitaj de William Auld. Ili enhavas po 70 paĝoj da noveloj, artikoloj, poemoj kaj ilustraĵoj varie elektitaj. Eldonis UEA.

Prezo: po 2,— gld. (8 steloj).



Teksto: "Por la Internacia Lingvo — kontraŭ lingva diskriminacio" — "Jaro de Homaj Rajtoj".

MEMORIGA GLUMARKO

por la Jaro de Homaj Rajtoj 1968

Uzu ĝin vaste dum la tuta jaro!

Koloroj: ora, oranĝa, malhelblua.

Prezo: 0,50 gld. por 10 markoj. Eldono de UEA.

Ne forgesu

LA TAGON DE LA HOMAJ RAJTOJ:

10 DECEMBRO

Distribuu la Esperantan tekston de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies kvara eldono jam aperis.

Vi pagas nur la sendokostojn: por 25 ekz. 2 int. respondkuponojn (0,90 gld); por 50 ekz. 4 rpk.; por 100 ekz. 6 rpk.; por 200 ekz. 8 rpk.

Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA

La ĉie ŝatata rektametoda lernolibro

PRIVILEGIA VOJO

al lingvoscio: Esperanto

Jam 16 500 ekzempleroj presitaj de la internacia kaj naciaj eldonoj! Bone uzebla tiel por kursoj kiel por memlernantoj: Instruas ĉiujn novajn vortojn per simboloj, ilustraĵoj aŭ per jam lernitaj vortoj; kontinua teksto.

Mendebila kun instrukcioj en angla, araba, dana, franca, germana, hebrea, hispana, itala, japana, nederlanda, norvega portugala kaj Esperanto laŭ elekto.

Prezo: 13 steloj (3.25 gld.) plus afranko. Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA.

LERNOLIBRO POR LA TUTA MONDO

POR LA JARFINA SEZONO

Serio de 6 bondezirkartoj "MONDFAMAJ PENTRAĴOJ" (Rembrandt, Da Vinci, Breughel, Renoir, Van Gogh, Utrillo), duoblaj kartoj, kun kovertoj.

Prezo: 3,75 gld.; 15 steloj

Serio de diversaj Novjarkartoj "ORA JARCENTO HOLANDA" (Rembrandt k.a.), poŝtkartoj.

Prezo: 1,50 gld., 6 steloj

Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

AVIADILA KARAVANO PORTLAND 1972

Partoprenu ankaŭ vi! Kelkaj dekoj da personoj jam anoncis sin. Zorgu, ke vi ne maltrafos ĝin. Vidu la informojn sur paĝo 94 de la juna numero de la revuo Esperanto 1968. Korespondadojn bonvolu direkti al F-ino M. H. Vermaas, Komisiito por Specialaj Taskoj, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-2 (privata adreso).

KOLEKTU LA ELDONSERION

ORIENTO - OKCIDENTO

eldonatan sub aŭspicio de UEA

LUKSAJ VOLUMOJ DAŬRE VALORAJ

1. **MALSATA ŜTONO**, sep emociaj rakontoj de la plej glora hinda aŭtoro de modernaj tempoj, Rabindranath Thakur (Tagore). Vive reflektas la socian kaj naturan fonon de Hindujo. El la bengala originalo tradukis L. Sinha. 127 p., 8 ilustraĵoj. Bind. 11,50 gld.
2. **RAKONTOJ DE OOGAI**, kvar diverskarakteraj verkoj de la elstara japana novelisto Mori oogai. Koncizaj noveloj, densaj je dramaj okazaĵoj. Inkluzivas la filmitan "Sansyô-dayû". Kvar malsamaj tradukintoj. 116 p., 2 bildoj. Tolbind. 10,25 gld.
3. **LA NAŬZO**, eksterordinara romano de la franca filozofo-romanisto Jean-Paul Sartre. Intima taglibro de homo, kiu esplorvagas en sia konscio. Bonega traduko de Roger Bernard. Eldono de UEA. 212 p., kun frontispico. Broŝ. 11,70 gld.
4. **KALEVALA**, la grandioza nacia eposo de la finna popolo, plena je mitaj heroaĵoj, praa folkloro, majesta poezio, eĉ humuro. Monumenta, 30-jara traduko de J. E. Leppäkoski, "riĉa rezulto de admirinda fortostreĉo, plena rego super la lingvo, majstra manipulo de formo" (Kalocsay). 368 p., 100 vinjetoj. Bind. 25,— gld.
5. **MARTÍN FIERRO**, iasence la nacia eposo de Argentino, liberritma verko de José Hernández. Vigla, facile fluanta stilo gustanta je la senbrida vivo de la gaŭĉo. Rim-versa traduko de Ernesto Sonnenfeld. 289 p., ĉirkaŭ 1200 strofoj, ilustrita. Bind. 14,40 gld.
6. **REĜO LEAR**, unu el la ĉefdramoj de Shakespeare. Brile "Shakespeare-a" versa traduko de la majstro de Esperanta poezio, K. Kalocsay, "decida antaŭpaŝo en la kampo de la viva dramo" (Foote). Emocia enhavo plus ĝue legebla lingvaĵo. Eldono de UEA. 160 p. Bind. 16,50 gld.; broŝ. 14,— gld.
7. **KVIN VIRINOJ DE AMORO**, de Ihara saikaku, klasikulo de la japana erotika literaturo. Kvin ekzotikaj noveloj, kie la aŭtoro lerte intermiksas tragedion kun humuro, pasion kun satiro. Traduko de Miyamoto masao. 159 p., 42 samepokaj ilustraĵoj. Tolbind. 13,— gld.
8. **LA SPLENO DE PARIS**, proz-poemaro de la epokfara franca poeto Charles Baudelaire, laŭ sia enhavo komplementa volumo al la glora verko "La floroj de l'malbono". Tradukis Paul Lobut. 150 p., bindita per artefarita led, ilustrita. 12,50 gld.
9. **EL LA VIVO DE SYUNKIN**, verkoj de Tanizaki Zyun'itiro (1886-1965), internacie konata japana romanisto-dramisto. Enhavas kvar verkojn: novelojn "El la vivo de Syunkin" kaj "Knaboj" kaj dramojn "Okuni kaj Gohei" kaj "Mumyô kaj Aizen". Tr. Miyamoto masao kaj Isiguro teruhiko. 145 p., illus. Bind. 14,— gld. (56 st.); broŝ. 11,— gld. (44 st.).

Krome, eksterordinara eldono en la serio:

LA DIA KOMEDIO, de Dante Alighieri, mondliteratura verko bezonanta nenian prezenton. Traduko de Giovanni Peterlongo kun paralela itallingva originalo. Lukse bindita, 709-paĝa, kun unika kolekto de ilustraĵoj de Botticelli. 36,— gld.

Aperos baldaŭ pliaj gravaj titoloj

Ciuj mendeblaj rekte ĉe la libro-servo de U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando

